»Tiel juna kaj jam tiom morale difektita«, bedaŭris ili ĝin kaj sentis samtempe teruron en ilia morala konscio lekante la buŝojn post lardo. »Tiel frue ĝi falis en la manojn de Justeco«.

»Mi estas kulpa kompare kun vi sole per mia juneco kaj nesperteco«, eksopiris la kaptita muso, »sen tio mi povis esti same honesta kaj perfekta kiel vi.«



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Nacionalismo. Ne, nacionalismo ne estas ĉio. Mi ĉiam kredis kaj kredas, ke homo estas plenrajta ano de grandega familio — homaro — al kiu ajn nacio ĝi apartenas. Tial la celo de ĉiuj aspiroj estas kaj devas esti internacieco. Sed ne sufiĉas deziri sole la internaciecon, estas necese ankaŭ serĉi la rimedojn por efektiviĝi ĝin; kaj nacionalismo estas unu el la efektivigiloj de internaciismo. Kaj tio ĉi tute, laŭ mia opimio, ne estas ia anaĥronismo. Franco ekzemple, kiu diras, ke ĝi estas internacianalista kaj tial ne volas labori por Francoj, ĉar labori por ili estus nacia laboro, tia persono estus aŭ mokulo aŭ nenionfarulo, simple kandidato por la frenezulejo. Atentu, ke mi diras, ke nacionalismo estas unu el la efektivigiloj de internacieco kaj ne iu absoluta unusola panaceo. Tiel mi resumas mian ideon: la bazo de homa feliĉeco estas interkonsento t. e. komuneco de reciprokaj interesoj, alie dirite internacieco; kaj por alveni al tio oni neniel devas forpreni ĉe iu ajn ĝian rajton ekzisti kaj disvolviĝadi. Sole en diverseco de formoj antaŭeniras homa progreso. Jen kial la nacionalismo povas ĝis kelka grado konkretigi la internan zencan kaj ideon de internaciismo. *Eydelnanth.*

Pri la libereco skribis bohema estetikisto F. X. Šalda jenajn legindajn vortojn, kiujn devus esperantistoj kaj esperantistaj verkistoj tre ofte legi kaj relegi: »Neniam oni malbonuzadis la vorton libereco, kaj neniam oni ĝin komprenis pli malbone, neniam oni pligrandigas ĝian valoron pli multe ol hodiaŭ; kaj en tio estas finfine nia tuta nekultureco. — Homoj pensas, ke ili diris la finan saĝon de ĉio, la lastan akiraĵon kulturan, se ili substrekas plej videble: libera stilo, libera teatro, liberaj tendencoj, libera arto. — Elekti el milo da povebloj la solan neceson: jen la arto, jen la stilo. La tutan malgajan eraron de la hodiaŭo oni povas doni en frazo: oni metas

kiel celo tion, kio estas sole elirpunkto. Libereco sola ne sufiĉas por fari bonan verkon, eĉ verkon tre malgrandan, sed libereco sola povas detrui eblecojn eĉ por verkoj plej grandaj kaj plej fortaj.« — Tiujn parolojn niaj amikoj neniam tro ofte memoras. Ĉu ne ŝajnas, ke ankaŭ le evoluo de sociologia kreaĵo povas esti sole unusola? Ke ekzemple esperanto, kaj sole esperanto, estas ebla kaj praktika solvo de la problemo de helpa lingvo, sed ke ankaŭ ĝia evoluo povas esti sole unu, do ne laŭvola laŭ iniciatoj de individuoj, sed unusola laŭ neceso de unueca kulturo internacia? *Kamaryt.*

La Indoeŭropaj lingvoj. Laŭ la artikolo de prof. Cart »Pri la Indoeŭropaj lingvoj kaj esperanto« (Lingvo internacia XV, 1) ni donas la dividon de tiuj lingvoj (l. = lingvo, d. = dialekto): I. Azia grupo: 1. Inda subgrupo: a) sanskrita l., b.) prakrita l., (pali ktp.), c.) modernaj d. (hindi, hindustani, bengali ktp.); 2. Irana subgrupo: a) zenda l., b) persa l., c) modernaj d. II. Eŭropa grupo: 1. Helena subgrupo: a) ionaj d. (atika, komuna greka l. ktp.), b) ne-ionaj d. (dora, lesba ktp.); 2. Itala subgrupo: a) latina l. (provenca, franca, itala, hispana, portugala, reta, rumana), b) umbra l., c) oska l. ktp.; 3) Kelta subgrupo: a) gala l., b) irlanda l., c) modernaj d. (gaela, ersa, brita ktp.); 4. Germana subgrupo: a) gota l., b) nora l. (islanda, danonoverga, sveda), c) malalta germana l. (flamlanda, holanda, platgermana, angla), d) alta germana l. (nuna germ. l.); 5. Letoslava subgrupo: a) baltaj l. (latva, leta, antikva preŭsa), b) slavaj l. (rusa, pola, bulgara, serba, kroata, dalmata, ĉeĥa, morava*) ktp.) 6. Armena subgrupo. 7. Albana subgrupo. *Nemo.*

Kie naskiĝis Comenius? Longe oni ne sciis, kie naskiĝis la granda instruisto de nacioj, glora bohema pedagogo *Jan Amos Komenský* (Johannes Amos Comenius, 1592—1670). Precipe tri moraviaj lokoj batalis pri la honoro esti naskiĝa loko de la lasta episkopo de persekutata Bohema frataro (Jednota bratrská): *Komna*, ĉar li subskribadis sin sur la bohemaj verkoj *J. A. Komenský*, sur la latinaj verkoj *J. A. Comenius*, *Nivnice*, ĉar li kelkfoje (ekz. en la universitato de Herborn) subskribadis sin *Nivnicensis* (*Nivnický*), *Uherský Brod*, ĉar li plej ofte subskribadis sin en la aferoj oficaj *Hunnobrodensis* (*Uherskobrodský*) kaj ĉar la filo Daniel (kiu certe povis scii de la patro mem, kie li naskiĝis) skribigis sur lian monumenton »natus Hunnobrodae« (naskita en Uherský Brod). Multajn jarojn oni serĉis, esploris, kiu el la nomitaj lokoj estas naskiĝa loko de Comenius. Nur nun la problemo estas solvita. En tiujara (1910) januara numero de »*Časopis českého musea*« (Revuo de la bohema muzeo) pastro Jan Nep. Jelínek (Bojkovice) publikigis la studaĵon, en kiu li bone dokumentas, kial *J. A. Komenský* uzadis la nomojn *Komenský*, *Comenius*, *Nivnicensis*, *Hunnobrodensis* kaj konvinke kaj sukcese li pruvas, ke la naskiĝa loko de *J. A. Komenský* estas *Uherský Brod* (*Hunnobroda*). La patro de *J. A. Komenský*, *Martin Komenský*, translokiĝinte el *Komna* en *Uherský Brod* (kie *Jan* naskiĝis), estis nomata *Komenský* (*Comenius*) — la loĝantoj tiel nomis la novan najbaron venintan el *Komna*; de tie devenas la nomo *Komenský*, *Comenius*. Tiam li ne havis filon *Jan* (*Johano*), sed en *Uher. Brod* li mortis (1604), sekve *J. A. Komenský* naskiĝis tie kaj de tio devenas la nomo *Hunnobrodensis*. Kiam *J. A. Komenský* fariĝis orfo, li estis ĉe parencoj kaj lernis en *Nivnice* (1604—1611), kiu estis lia lasta loĝoloko antaŭ la foriro en la universitaton, kie li nomis sin laŭ tiu ĉi sia lasta loĝoloko; de tie devenis la nomo *Nivnicensis*. La biblian nomon *Amos* li akceptis kiel membro de Bohema frataro. Sekve oni nun povas certege aserti, ke *Jan Amos Komenský* naskiĝis en *Uherský Brod* (*Moravio*) en la jaro 1592. — Ni dezirus, ke tiu ĉi notizo (ni kredas la unua en nebohema lingvo)

*) ?! ? *La red.*

helpu disvastigi ĉi tiun novan kaj ĝis nun nesufiĉe konatan fakton; tiun ĉi deziron ni direktas precipe al niaj eksterbohemiaj legantoj. *Bšk.*

Dek moralaj ordonoj de Komenský: 1. Ne rakontu ĉion, kion vi scias; ne kredu ĉion, kion vi aŭdas; ne postulu ĉion, kion vi vidas; ne faru ĉion, kion vi povas, sed sole tion, kion vi devas kaj vi estos singardema. 2. Estu modesta, ne aroganta, silentema, ne parolema! Kiam iu parolas, silentu; kiam iu diras ion al vi, aŭskultu; kiam li ordonas ion al vi, vi estu ĉiam kompleza. 3. Estu afabla kontraŭ ĉiu, estu flatema kontraŭ neniu; evitu flatil! 4. Estu plu super ĉio justa! Postulu nenion fremdan, nenion proprigu al vi! 5. Vi devas esti ankaŭ brava, vigla por labori; lasu la liberan tempon al la mallaboremuloj. 6. La Fortuno estas kapricema, ĝi alportas diversajn okazojn, multfoje malĝojajn. Tiujn ĉi la homo pacienca toleras, timemulo sopiras, ploras kaj ĝemas. 7. Estu ankaŭ bonvola kaj kompatema! Se iu petas vin pri io, donu al li, se vi havas; al la malfeliĉulo helpu, se vi povas! 8. Se iu ofendis vin, pardonu al li la kulpon. Se vi faris la malbonon al iu, kontentigu lin kaj senkolerigu lin! Estas belege subpremadi la koleron, pardonadi al la kulpiĝinto kaj al la petinto pri la pardono. 9. Enviu al neniu, deziru al ĉiu, faru agrablaĵon, al kiu vi povas kaj vi plaĉos al ĉiuj bonaj homoj. 10. Parolu ĉiam la veron, ne volu mensogi!
Trad. Hkb.

10 konsiloj al la esperantaj tradukantoj (El »Revuo internacia« 1, 3, 87). 1. Ne traduku por preso, se vi ne ellernis ankoraŭ esperanton. 2. Traduku sole el via propra lingvo. 3. Ne traduku tradukaĵojn. 4. Ne traduku malnovaĵojn. 5. Ne traduku trivialaĵojn virtajn kaj malvirtajn. 6. Ne traduku ne konatiĝante kun la nova literaturo de via propra lingvo, kun ĝiaj tendencoj kaj formoj. 7. Memoru, ke perloj de literaturo malofte troviĝas en familiaj ilustritaj revuoj. 8. Memoru, ke krom etimologio ekzistas ankoraŭ sintakso. 9. Plej ofte distranĉu frazojn per punktoj, plej ofte disŝiru kunmetitajn vortojn. 10. Ne traduku versojn, ne ellerninte regulojn de versofarado entute kaj de l' esperanta aparte. *Pasanto.*

Rim. Ni represas ĉi tiujn konsilojn de *Pasanto* (Ivan Seleznjov) unue por rememorigi al niaj kunlaborantoj rekomendindajn principojn por tradukado, due por rememorigi la veran fonton de la konsilaro al kelkaj gazetoj, kiuj lastatempe reprenis ĉi tiujn regulojn aŭ ne citante la originan revuon aŭ citante malprave la alian. *Red.*

Esperantista movado inter Bohemoj (Kroniko). Tiujare oni instruas oficiale esperanton en kvar bohemiaj lernejoj: en komerca lernejo de Maděra en Praha (instruas s-o H. K. Bouška), en gimnazio en Telč (s-o prof. Kasalý), en reala lernejo en Litovel (s-o prof. Urban) kaj en knabina industria lernejo en Ĉes. Budějovice (s-o instr. Svačina). Oficialaj kursoj pri esp. estas ankaŭ en blindulejo de Klár en Praha (s-o Macan, f-ino Vaničkova). Tre multenombraj estas publikaj kursoj pri esperanto: preskaŭ en ĉiuj urboj bohemiaj kaj moraviaj oni publike instruas esperanton, en kelkaj urboj (Praha, Smíchov, Vinohrady, Žižkov, Nusle, Plzeň k. a.) oni instruas en kelkaj kursoj. Sufiĉe multenombraj estis ankaŭ publikaj paroloj pri esperanto. Ankaŭ jubileo de Dro Zamenhof estis solene festita en ĉiuj partoj de la bohemiaj landoj per solenaj paroloj, kunvenoj, festenoj, artikoloj ktp.; precipe bone estis rememorigita la festa tago en Praha, Smíchov, Vinohrady, Plzeň, Písek, Bystřice, Vsetín, Mor. Ostrava, Vídeň k. a., kie la lokaj societoj bone uzis tiun ĉi okazon por altiri la atenton de la publiko al nia lingvo kaj ĝia kreinto. Oni do vidas, ke la bohema esperantistaro ne mallaboras; sed tamen ni ne povas preterrigardi,

ke la energio de niaj batalantoj iom malplifortiĝis. Ni esperu, ke tju ĉi fenomeno estas sole efemera.

H. K. Bouška.

Rim. Tiu ĉi resuma kroniko de la enlanda movado estas destinita por niaj nebohemiaj legantoj, precipe por la esp. gazetaro, kiuj ne povas interesi sin pri ĉiuj lokaj detalaĵoj (publikigataj en la bohema parto de nia revuo), sed tamen deziras scii la ĉefajn rezultatojn de la bohema laboro por esperanto, same kiel bohemiajn legantojn povas interesi sole rimarkindajn faktoj el la alilanda movado (kritike elektitaj kaj revue ordigitaj en la bohema rubriko »Kronika a komentář«). Jen la klarigo pri la labormetodo de nia kronikisto, kiun metodon kelkaj ne povis aŭ ne volis kompreni.

Red.

Esperantistaj organizaĵoj en Praha. En la nova adresaro de la ĉefurbo Praha (1910) estas registritaj 18 oficiale starigitaj societoj esperantistaj. Jen ilia nomaro: 1. Svaz českých esperantistů-Bohema asocio esperantista (Praha II, 1036/XIV), 2. Bohema unio esperantista-Unie ĉes. esp., 3. Bohema propaganda societo esperantista, 4. Svaz ĉes. esp.-Česká liga esperantská-Bohema asocio esperantista-Ligo de bohemiaj esperantistoj, 5. Bohema societo esperantista en Praha (Praha I. 320), 6. Klub esperantistů v Praze-Esperantista klubo en Praha, 7. První dámský český spolek esperantský v Praze-Unua virina bohema grupo esperantista en Praha (Praha I, 320), 8. Klub esperantistů malostranských (Praha III, 495), 9. Klub českých číšníků esperantistů-Klubo de bohemoj esperantistoj en Praha, 10. Esperantista laborista klubo en Praha VII (Praha VII. 428), 11. Akademia esperanto-klubo en Praha, 12. Klub esperantistů v Praze VIII.-Esperantista klubo en Praha VIII, 13. Esperantista klubo en Prosek-Klub esperantistů v Proseku, 14. Esperantista klubo en Smíchov, 15. Esperantista klubo en Král. Vinohrady, 16. Esperantista klubo »Nova stelo« en Žižkov, 17. Esperanto-Verein »Verda stelo« Prag, 18. Klub »Stelo de espero«. El ĉiuj 18 societoj estas 17 societoj de bohemiaj esperantistoj kaj unu (Esperanto-Verein »Verda stelo«) de germanaj esperantistoj, kiu apartena al la ligo de germanlingvaj esperantistoj en Aŭstrio. Krom tio funkcias kelkaj oficiale neaprobataj rondetoj, kiujn la adresaro ne registras. En la nomaro de la gazetoj elirantaj en Praha estas nomataj en la adresaro du gazetoj bohemesperantaj: Český esperantista-Bohema esperantisto (Praha III, Kampa 495) kaj Časopis českých esperantistů.

Nemo.



LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Raporto pri la kvina kongreso de esperantistoj. De *Dro P. Corret*. Paris, Presa esperantista societo, 1909. Prezo 75 ctm. (Pg. 48 + XXIV.) — La raporto pri la esperantista kongreso en Barcelona (1909) estas eltirita el »Lingvo internacia«, en kiu s-o Corret sufiĉe detale priskribis la agadon de la kongreso kaj de ĉefaj esp. institucioj. Ni rekomendas tiun ĉi broŝuron al ĉiu, kiu deziras scii pri la detalaĵoj, kiujn ne povis doni la konciza raporto en nia revuo.

Bšk.

La fianĉinigo de Sovagulineto. Triakta komedieto originale verkita de *Roksano*. Eldonaĵo de »Tra la filatelio«. Prezo Sm 0'24 (Pg. 31.). Aĉetebla ĉe la aŭtorino (Béziers, rue Abélard 2, Francujo.) — Dek-sepjara filino de s-o Blakdelo, Suzano, estas sovaĝulineto, kiu ne konas la artojn de moda sintenado, ŝi esprimas la sentojn de sia freŝa koro laŭ natura inklino kaj ĉe tia sovaĝulineto ne estas mirinde, ke

ŝi fariĝas amantino kaj amatino de la amiko svatanto anstataŭ la svatato. La komedieto de Roksano (J. Flourens) estas facile legebla kaj trovas certe multajn legantojn. *Hkb.*

Dictionnaire esperanto-français. Paris, Presa societo esperantista, 1910. Prezo: broŝurita fr. 2.—, bindita fr. 2.50 (Pg. 362). — Tiu ĉi verko enhavas ĉiujn elementojn de »Universala vortaro«, ĉiujn vortojn akceptitajn de Akademio kaj fine multenombrajn esprimojn uzitajn en la esperanta literaturo; ĝi sume enhavas 21.470 vortojn: 7.975 radikojn kaj 13.495 derivaĵojn! Ĝi donas multegon da materialo, da materialo ofte nova (por bohemiaj legantoj estas interese vidi, kiom da novaj vortoj aperis post la eldono de la vortaro de Ĉejka). La ekstera aranĝo de la vortaro estas bonega kaj praktika. *Hkb.*

La Revuo (IV, 6) publikigante la klarigon, ke en Bohemujo ekzistas du centroj esperantistaj (B. A. E. por kluboj kaj individuoj, B. U. E. sole por kluboj) kun preskaŭ la sama nombro da anoj, ke sekve ĉiu el ambaŭ organizaĵoj rajtas fari deklarojn sole en sia propra nomo, sed ne en la nomo de ĉiuj bohemiaj esperantistoj, asertas: »La Bohema asocio esperantista estas bone konata kaj ŝatata en la esperantistaro, kaj malpli ol iu ajn »La Revuo« ĝin forgesos, tial ke ĝia korespondanto mem s-o Th. Ĉejka estas ja agema ano de tiu Asocio.« Ni kontente registras tiun ĉi deklaron pli kiel la promeson por la venonta tempo ol kiel la konstaton pri la stato en la pasinta tempo (ni estis ja ignorataj de »La Revuo«: oni ne enpresadis la raportojn de nia partio, sed samtempe oni donadis la lokon al la alia partio; ĝis nun ni ne ricevas la eldonaĵojn de »La Revuo«, sed la redakcio de la kontraŭa partio ricevas ilin ktp.) ĝojante, ke ĉiuj mensogoj, perfidaĵoj kaj atakoj kontraŭ ni faritaj restas sen la rezultato. *Bšk.*

The British Esperantist (VI, 62) komunikas, ke la 15. de jan. oni starigis societeton »Brita societo de la junaj esperantistoj«, kiu celas propagandi esperanton inter la gejunularo en la brita imperio. Certe bona afero! *Rd.*

Germana esperantisto (VII, 2) en la artikolo »Ni ne trograndigu!« (J. Borel) ekstaras kontraŭ tre malbonan kutimon de tro multaj propagandantoj: trograndigadi. Ni multe batalis kaj batalas kontraŭ tiun ĉi propagandan metodon, tial ni kun plezuro legas tiun ĉi artikolon kaj rekomendas ĝin al la legantoj. Kaj ni plene subskribas la vortojn: »Kiom da saĝaj homoj oni fortimigis ĉe utilaj entreprenoj per ĉarlatana fanfaronado! Ĉarlatanaĵoj sukcesas ĉe malsaĝuloj kaj allogas ilin, sed ni ne bezonas malsaĝulojn en nia movado, sole inteligentuloj povas fari servojn al ĝi, povas ĝin progresigi; tiajn utilajn homojn ni devas altiri al ni. Bedaŭrinde, kiam tiaj homoj unue aŭdis la bruon voĉon de la ĉarlatanoj, ili preskaŭ certe estas perditaj por ni.« »Ĉu ni ne havas sufiĉan, sufiĉegan argumentaron por pruvi publike la bonegecon de la esp. afero kaj ĝian gravecon? Ni sole citu la faktojn sen ia pligrandigo nek aldono, ili jam sufiĉe elokvente parolas per si mem. Ĉiu pripensanta homo, kiu estos atentigata pri tiuj faktoj, komprenos; oni sole devas klare prezenti al ĝi la veron.« Bedaŭrinde estas multaj homoj, kiuj per sensencaj (konsciaj) mensogoj gajnas sensignifajn malsaĝulojn kaj poste fanfaronas, kiom da grupoj ili fondis! Kaj pli grandan sentaŭgaĵon ili faras: per malveraj informoj ili konscie trompas eĉ homojn, kiuj amas la veron, kaj tamen trograndigas, ĉar ili fidis la informojn de tiaj ĉarlatanoj! Ni forte batalu kontraŭ tia ĉarlatanado! *Bšk.*

Informaj raportoj (IV, 2) raportas: »En la estrarokunveno de GAEL je la 17. de jan. 1910 estis prezentata letero de la fervojo Wien-

Aspang, kiu petas la Ligon, traduki kunsenditajn reklamfoliojn esperanten por reklamo en ĉiulandaj stacidomoj k. t. p.» B.

Semo. Monata gazeto. Adr.: Barcelona, str. Montseny 67/2. Abonpago 1 Sm. — Okpaĝa esperanta revueto eldonata de la societo »Paco kaj Amo«. B.

Gazeto Andaluzia. Esperanta monata revuo. Adr.: San Fernando (Cadiz), Munoz Torrero 10, Hispanujo. Abono: 1.40 Sm. — Organo de la Cadiz'a regiono en Hispanujo. B.

La Ondo de esperanto (Волна эсперанта). Adr.: Moskva, Tverskaja 28, Rusujo. Abono: 1.06 Sm. — Rusesperanta monata gazeto. — En la 1a n-o nunjara estas la jara revuo pri esp. movado en Rusujo en 1909. La aŭtoro (A. S.) konstatas, ke multaj rusaj ĵurnaloj parolis pri esp., kelkaj ĵurnaloj (Vestnik Znanija, Vokrug Sveta, Torgovij Mir k. a.) donis al siaj abonantoj esp. lernolibrojn, en Moskva estas speciala esperanta librejo, grandaj eldonistaj firmoj (Posrednik, Sitin k. a.) eldonis esp. librojn, kelkaj kursoj pri esp. estis farataj en regnaj lernejoj, oficiale estis permesita (dec.) la fondo de Esperanto-instituto en Moskva, estis fonditaj 12 novaj societoj, eliras esp.-rusaj gazetoj »La Ondo de esperanto« (regule) kaj »Ruslanda esperantisto« (neregule). Rd.


Finna esperantisto. Oficiala monata organo de Esperanto-asocio en Finnlando. Adr.: Ilarejo esperantista, Helsingfors, Finnlando. Abonprezo 1.20 Sm. — Modesta revuo por esperantistoj de simpatia Finnlando. B.

Idealisto. Monatal organo de la idealisti. Adr.: Židenice (J. Kajš), Moravio. Jarabono: 3 fr. — La unua organo idista eldonata en la bohemiaj landoj. Ĝi estas okpaĝa revueto propaganta per ido abstinentismon, vegetarismon, pacifismon kaj similajn ideojn. B.

Diversaj eldonaĵoj. — *Internacia instituto de esperanto.* Programo (vidu la informojn en »Ĉ. e.« III, 172). — *Bulgara esperanto-biblioteko:* 1. Единъ часъ по есперанто (Th. Cart). 2. На пжтя за единъ международенъ езикъ (Th. Cart - M. Hankel). Прѣвелъ отъ френски: Ив. X. Кръстановъ. Rd.

Ricevitaj gazetoj. — *La Revuo* (IV, 6). Proverbaro esp. Kroata kulturo. Juliusz Slowacki. Washington. — *Lingvo internacia* (XV, 1). La lasta (Reymont-Kabe). — *Esperanto* (VI, 70, 71). Helpilo de eksporto en Aŭstrio. Pri trostudado. — *La Simbolo* (1, 12). Francisco Ferrer. Letero pri Praha. — *La Duonmonata* (1, 7, 8). Pri la kondiĉoj de idealaj lingvaj rilatoj en la homaro. Esperanto kaj patriotismo. — *Internacia socia revuo* (IV, 2). Kontraŭ la milito. — *Voĉo de kuracistoj* (III, 3). — *Semo* (1, 1). — *Gazeto Andaluzia* (1, 1). — *Libera penso* (5). Kontraŭ la milito. — *Juna esperantisto* (VIII, 1). — *The British Esperantist* (VI, 62). — *Germana esperantisto* (VII, 2). — *Informaj raportoĵoj* (IV, 2). — *Germana esperanto-gazeto* (III, 3). La esperanta literaturo. Dek reguloj. — *Svisa espero* (VIII, 1). — *Belga esperantisto* (II, 3). Pri volapük. — *Norvega esperantisto* (II, 1). — *Finna esperantisto* (III, 11-12). — *La Holanda pioniro* (II, 5). Kritiko. — *La Suno hispana* (VII, 74). — *La Ondo de esperanto* (1910, 1). — *Antaŭen esperantistoj!!* (VI, 10). — *Verda stelo* (III, 2). — *Rumana gazeto esperantista* (III, 2). Strakonica kantosakisto Švando. — *Kolombia stelo* (1, 4). — *Rund um die Welt* (1, 2). — *Sarta stelo* (III, 20). — *Normanda stelo* (III, 2). — *Progreso* (II, 12). — *Idealisto* (1, 1). La milito. Pro quo 1 infanti mentias (el »Pepánek nezdara«). Rd.

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

 Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!

ESPERANTISTA KAFEJO „DERBY“

PRAHA VII.

esperantistaj gazetoj. Por bona priservado
garantias

M. VALENTA.

Knih tiskárna :: POLITIKY :: v Praze, Václavské nám.

Zhotovuje veškeré tiskopisy od nejmenších do nejobsáhlejších, a rozsah závodu, bohatý výběr písem i ozdob, nejdokonalejší stroje a dobré odborné síly umožňují dodávat tiskopisy nejen elegantně, ale i slohově upravené. Rozpočty na požádání ihned se podají. Vyřídí veškeré zakázky rychle, za ceny mírné. Zhotovuje knihy a brožury všeho druhu: díla matematická, cizojazyčná a díla ve všech slovan. jazycích, uměl. alba, katalogy, cenníky, prospekty, doporučenky, tabele, účty, dopisní papíry, obálky dopisové se záhlavím; plakáty, divadelní cedule; tiskopisy příležitostné, navštivenky, svatební a promoční oznámení, pozvánky atd. Sklad tiskopisů pro spořitelny.




FR. SKRČENÝ

V PRAZE, VODIČKOVA ULICE 32.

Filiálka: Příkopy, č. 27 n. „Velký Bazar“

doporučuje ve velkém výběru za velmi levné ceny:

Lampy, lustry, ampule, sklo, sklenice na pivo, víno, vodu a likéry. **Porculánové** příbory jídelní, na kávu a čaj. **Domácí a kuchyňské nádobí. :: Úplné vybavy pro nevěsty. ::** Cenníky zdarma.

 Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!

Krajky, stuhy, ozdoby,

krejčovské potřeby

:: velmi levně nabízí ::

F. MABINA, Král. Vinohrady,

Palackého tř. čís. 20, vedle záložny.

Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice esperanta.** Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 2. **Slovníček esper.-český.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 30 h, poštou 33 h.
Sv. 4. **Methodická učebnice esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky). Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátu K 1'10, poštou K 1'20.
Slovník česko-esperantský (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka. Cena 90 h, poštou 95 h.

Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice esperanta.** Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1'50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de esperanto**“.
Sv. II. **Slovník esper.-český** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2'50, poštou o 10 h více.
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.
Sv. IV. **El la historio de esperanto.** Obsahuje Dr. L. Zamenhofův „List o původu esperanta“ a zajímavou řeč Dra K. Beina a Dra L. Zamenhofa, proslovenou na I. kongresu esperantistů 1905. — Cena 30 h. Spisek tento hodí se znamenitě k dalšímu cvičení v esperantu, zvláště pro výborný sloh esperantský.
Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Česky esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5'50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zapravení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostýn, Morava.**

Propaganda. Nejvhodnější pomůckou propagační je „**Esperanto esperantsko-český na jednom listě**“. Úplná mluvnice a slovník (obsahuje všechna základní slova, na 2000 kmenů tedy skutečný klíč k Esperantu)! — 1 výt. za 2 h, 10 výt. franko za 20 h, 50 výt. za 55 h, 100 výt. za 1 K, 500 výt. za 3 K, 1000 výt. za 5 K. — Za obnos předem obdržený (i v poštovních známkách) zasílá **Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Morava.**

JOSEF MALÝ, Praha VII.,

Na Výšinách

fabrika: specialan komodon matracon „Esperantan komodon“. Prezarojn kaj informojn oni donas senpage.

Specielní výroba ražených vinět.

KAREL KOLMAN Král. Vinohrady,
Čelakovského ul. 39.

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III. 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.